


La 25an de junio 2015

## Energipolitiko de la registaro kaj la kontraŭbatalo de popolanoj

Dum la pasintaj 3 monatoj okazis diversaj aferoj rilate al la energipolitiko de la registaro kaj la kontraŭbatalo de popolanoj. Hodiaŭ mi raportos pri tiuj aferoj.

### Reaktoroj sub la ekzameno de Nuklea Reguligada Aŭtoritato



### La tribunalo Fukui ne aprobis la refunkciadon de la nuklea centralo Takahama

La 14an de aprilo la tribunalo de Fukui malpermesis refunkciadon de la 3a kaj la 4a reaktoroj de la nuklea centralo Takahama en la gubernio Fukui. La verdikto okazis en la kadro de “Provizora procedo”, kies rezulto tuj efikas, dum la ordinara juĝado necesas multajn jarojn ĝis la fina konkludo. La elektra kompanio Kansai estas malkontenta kaj postulas nuligon de tiu verdikto en tribunalo, sed ĝis la fina konkludo ĝi bezonos multajn jarojn, do dume ĝi ne rajtas funkciigi tiujn reaktorojn.

La verdikto diris, ke la nova normo por sekureco de la nuklea centralo, kiujn la registaro leĝigis post la nuklea akcidento en marto 2011, estas tute ne sufiĉa, do eĉ se tiuj du reaktoroj estas konformaj al la normo, tio tute ne garantias ilian sekurecon.

Tiu verdikto donis grandan baton al la kompanio kaj la registaro. Mi estas tre ĝoja pro tiu kuraĝiga verdikto.

### **La tribunalo Kagoŝima aprobis refunkciadon de la nuklea centralo Sendai**

La 22an de aprilo la tribunalo Kagoŝima aprobis refunkciadon de la 1a kaj la 2a reaktoroj de la nuklea centralo Sendai. Ĝi aprobis la novan normon kaj konkludis, ke la reaktoroj konformaj al tiu normo povos redukti danĝeron al ignorebla nivelo.

Eĉ post la nuklea akcidento en Fukuŝima, troviĝas tribunalo, kiu ankoraŭ sekvas blinde la registaron. Tio estas nekredebla afero.

### **Kvin reaktoroj estas forĵetotaj**

La 17an de marto du elektraj kompanioj decidis forĵeti tri reaktorojn kaj la 18an de marto aliaj du kompanioj decidis forĵeti aliajn du. La kompanioj decidis la forĵetadon, ĉar ĉiuj reaktoroj estas malnovaj (39-jaraj ~ 44-jaraj) kaj ilia produktokvanto de elektro estas malgrandaj (360 ~ 560 mil kilovatoj). Por konformigi ilin al la nova normo, la kompanioj bezonos multegon da mono kaj tio ne donos profiton al ili.

Por perfekte forĵeti reaktorojn, oni bezonos minimume 30 jarojn. Oni ankoraŭ ne povas decidi, kien kaj kiel meti aŭ konservi la elprenotajn nukleajn brulaĵojn kaj radioaktivajn rubaĵojn el la malkonstruotaj reaktordomoj.

La 30an de aprilo la elektra kompanio Kansai petis plilongigon de funkcioperiodo de siaj du reaktoroj n-ro 1 kaj 2 en Takahama, kiuj baldaŭ fariĝos 40-jaraj. Laŭ la normo oni rajtas unu fojon plilongigi la periodon je 20 jaroj. Dum la venontaj 10 jaroj, aliaj 10 reaktoroj fariĝos pli ol 40-jaraj.

Mi esperas, ke Nuklea Reguligada Aŭtoritato, kiu ekzamenos la reaktorojn, ne aprobos la plilongigon. Ĉu troviĝas maŝinoj 40-jaraj aŭ 60-jaraj ĉirkaŭ ni? Estas freneze, ke la kompanioj konsideras tiujn malnovajn reaktorojn ankoraŭ sekure uzeblaj.

### **Elektro el nuklea energio estas la plej malmultekosta!**

La ministerio pri ekonomio kaj industrio publikigis sian planon pri la japana energikonsisto en 2030.

	2010	2013	2030
Recikliga energio	10%	11%	20%
Petrolo	7%	15%	5%
Natura gaso	29%	43%	25%

Karbo	25%	30%	30%
Atomenergio	29%	1%	20%

Antaŭ la nuklea akcidento en Fukuŝima, Japanio dependis de nuklea energio je preskaŭ 30%, sed nun ĉiuj nukleaj centraloj ne funkcias. La registaro kaj la elektraj kompanioj timigis nin, dirante, ke sen nuklea energio Japanio revenos al la feŭdisma epoko, sed dum la pasintaj 4 jaroj neniuj problemoj okazis. Nia ekonomio progresas kaj homoj ĝuas sian vivon. Do ni ne bezonas atomenergion, tamen la nukleaj centraloj donas grandan profiton al monavidaj politikistoj kaj kapitalistoj, do ili intencas ĉiel refunkciigi la centralojn, kaj por tio la ministerio konsideras nuklean energion kiel unu el la kvar gravaj energifontoj.

Por subteni la planon, la ministerio publikigis sian kalkulon pri kostoj de tiuj energifontoj jene:

Atomenergio:	10,1 enoj/unu kilovata horo
Karbo:	12,3
Natura gaso:	13,4
Petrolo:	28,9~41,6
Akvo:	11,0
Subtera varmo:	19,2
Vento:	13,9~21,9
Suno:	12,7~15,5


Vere, la kosto de elektro el atomenergio estas la plej malmultekosta! Tamen oni kalkulis tre ruze, ekskludante necesajn kostojn. Krome tre ridinde oni duonigis la oftecon de grava akcidento, pretekstante, ke post la akcidento en Fukuŝima la nukleaj centraloj en Japanio fariĝis pli sekuraj.

Por la akcidento de la nuklea centralo Fukuŝima la registaro kaj TEPCO jam elspezis/os kvantegon da mono jene:

Kompensa mono:	5421 miliardoj da enoj (54,21 miliardoj da euroj)
Purigado:	2500 miliardoj da enoj (25 miliardoj da eŭroj)
Konstruado de konservejoj de nukleaĵoj	1100 miliardoj de enoj (11 miliardoj da eŭroj)
Forĵetado de la reaktoroj kaj kontraŭrimedoj por poluita akvo	2000 miliardoj da enoj (20 miliardoj da eŭroj)

Estas ne tolereble por mi, ke oni kalkulas damaĝojn de la loĝantoj per monsumo. Nun en Fukuŝima 100 mil, 200 mil homoj vivas en malĝojo kaj malespero. Kiamaniere oni povus kalkuli iliajn vivperdojn? Se oni povus rigardi iliajn suferojn, la kosto de elektro el atomenergio fariĝus nekalkulebla. Por vere konsoli tiujn viktimojn, la plej gravaj estas forĵeto de ĉiuj reaktoroj kaj faro de senatomenergia Japanio.

## Erupcioj kaj tertremoj oftas



Sismologoj diras, ke post granda tertremo ofte okazas erupcioj. Ili estas pravaj. Nun en Japanio okazis, okazas kaj okazos erupcioj. En septembro 2014 okazis erupcio en la monto Ontake kaj mortis pli ol 60 homoj, en novembro la monto Aso erupciis, en januaro la monto Sakuraĵima erupciis, en majo la monto Hakone aktiviĝis, en la fino de majo la monto Kuĉinoerabu-ĵima erupciis kaj ĉiuj loĝantoj evakuis la insulon, kaj en junio la monto Asama erupciis.

La 30an de majo okazis teruriga tertremo, kiu malrapide kaj longe tremis. Ĝi okazis nekutime en la profundo de 682 kilometroj en la Pacifika Oceano. Sismologoj ne komprenas, kio okazigis tiun tertremon.

La japana insularo situas sur la kvar platoj, do ĝi estas nesto de tertremoj kaj erupcioj. Sur tiu danĝera loko staras pli ol 50 nukleaj reaktoroj. Do eĉ Nuklea Reguligada Aŭtoritato, kiu laboras laŭ la

energipolitiko de la registaro, ne aprobis la refunkciigon de la du reaktoroj  
Ŝiga kaj Curuga pro aktivaj faŭltoj troviĝantaj proksime al aŭ sub tiuj.

### **70% timas denovajn akcidentojn**

Multaj japanoj timas denovajn akcidentojn jene:

1) Ĉu vi opinias, ke akcidento samskala kiel tiu en Fukuŝima okazos?

Certe okazos: 22%

Eble okazos: 52%

Eble ne okazos: 24%

Certe ne okazos: 1%

2) Ĉu evakplanoj estas sufiĉe preparitaj?

Tute ne sufiĉe: 37%

Ne sufiĉe: 50%

3) Ĉu vi estas por aŭ kontraŭ la refunkciigo de la nukleaj centraloj?

Tute kontraŭ: 26%

Kontraŭ: 45%

Por: 24%

Bonvena: 4%

4) Pri la energipolitiko

Nun aprovu la refunkciigon kaj iom post iom malmultigu la reaktorojn  
53%

Tuj forĵetu ĉiujn reaktorojn 30%

Aprobu la refunkciigon kaj tenu la nunan staton 12%

(Laŭ enketo al 1200 homoj inter 15-jaraj kaj 79-jaraj en 200 lokoj en la tuta Japanio farita en aprilo 2015 de honora prof. Hirose Hirotada de la Virina Universitato de Tokio)

**HORI JASUO**